LA ANĜEVA FOLIO N° 22 **JANUARO 2012**

# LA ANĜEVA FOLIO
## LA FEUILLE ANGEVINE

Centre Culturel Angevin d'Espéranto
www.esperanto-angers.fr

**La date à retenir :**

**ASSEMBLÉE GÉNÉRALE**
**samedi 3 mars 2012**
**à 15h, Centre Jean Vilar**
**(quartier de la Roseraie)**
**avec la traditionnelle galette**

### *Quelques mots*

En ce début d'année, c'est la coutume fort agréable de présenter ses vœux. Que cette année soit donc celle de la découverte de nouveaux amis comme celle du renforcement des liens d'amitié avec nos "samideanoj".
Je vous souhaite ainsi qu'à votre famille, tous mes vœux de santé et de réussite pour la nouvelle année 2012.

*Pierre Jagueneau, Président*

### *Kelkaj vortoj*

En ĉi tiu jarkomenco estas agrabla kutimo sendi bondezirojn. Estu ĉi jaro, tiu de la malkovro de novaj amikoj kaj ankaŭ de la plifortigo de la amikecaj ligoj kun niaj samideanoj.
Mi deziras al vi kaj al viaj familianoj, sanon kaj sukcesplenan novan jaron 2012.

*Pierre Jagueneau, Prezidanto*



# Nia kongreso en Danio

## far Geneviève kaj Maurice (dua parto)



**96ème Congrès Universel d'Espéranto COPENHAGUE - 23-30 juillet 2011**

**5 Angevins (Angers - France) et 1460 autres congressistes de 66 pays y ont participé.**

Mes autres temps forts seront :
- la cérémonie d'ouverture présidée par Probal Dasgupta (actuel président de l'Association Universelle d'Espéranto, siégeant à Rotterdam). Il nous présenta le thème du congrès «Dialogue et Intercompréhension»,

- le message de Irina Bokova, Directeur général de l'Unesco et le message de salutations aux congressistes de Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof. Ils sont à lire respectivement en 1ère page de la gazette journalière du congrès «LA VOIX DU VIKING» n° 2 et n°3 : http://www.96uk-kopenhago.dk/knap-Bultenoj.html ou dans la revue «ESPERANTO» du mois de septembre 2011, pages 172 et 173.

- un moment d'intense émotion, suite au drame vécu dans son pays les jours précédents, a marqué l'intervention de la déléguée norvégienne, dont le chagrin a gagné tout l'auditoire du salon Zamenhof.

- les activités nombreuses et variées offertes : les concerts de Jomart et Natacha, le groupe Espo-Despo, la présentation du film «La langue universelle», la pièce de théâtre «les dix jours du capitaine Postnikov» ….

- le mini-concert improvisé par le groupe Kajto dans les escaliers menant à l'étage du centre de congrès. Ce fut une joyeuse ambiance, une chorale internationale sans prétention mais un vrai bonheur. Je remercie Michèle qui avait assisté aux ateliers de chants du groupe Kajto durant cette semaine de congrès et qui était informée de cette petite rencontre hors programme.

- nos nombreuses excursions dans la ville de Copenhague forte de 1 200 000 habitants (5 millions dans tout le Danemark) avec visite du palais Amalienborg, résidence de la famille royale avec la présence des gardes de la reine devant le palais, le parc Tivoli (4 millions de visiteurs par an) ou sur les canaux pour voir les anciennes et pittoresques constructions, maisons de briques rouges, anciens magasins à grains et l'incontournable statue de la petite sirène, icône nationale de la fable du conteur Hans Christian Andersen, qui naquit à Odense en 1805.

- excursion pour découvrir l'influence des Vikings, pas seulement des géants guerriers mais une civilisation organisée et très présente sur les îles du Danemark. Visite de Roskilde et son musée de vrais bateaux vikings puis, à partir du car, nous découvrirons quelques petits monts-sépultures à travers une campagne bucolique.

- la visite sur les pas d'Andersen au château d'Holsteinborg ; il y était très souvent invité car il amusait beaucoup les enfants. Deux pièces n'y ont même jamais été modifiées depuis son départ.



*La anĝeva grupo je la Kongreso. De maldekstre al dekstre : Maurice kaj Geneviève Gourichon, Arlette Frangeul, Michèle kaj Pierre Jagueneau*

*Le groupe angevin participant au congrès. De gauche à droite : Maurice et Geneviève Gourichon, Arlette Frangeul, Michèle et Pierre Jagueneau*

**96a Esperanta Universala Kongreso - KOPENHAGO - 23-30ajn de julio 2011**

**5 Anĝevanoj (el "Angers" Francio) kaj 1460 aliaj kongresanoj el 66 landoj partoprenis.**

Miaj aliaj gravaj momentoj estas:
- la malferma ceremonio kiun prezidis Probal Dasgupta (nuna prezidanto de U.E.A.). Li prezentis al ni la kongresan temon "Dialogo kaj Interkompreno".
- la mesaĝo de Irina Bokova, ĝenerala direktoro de UNESCO kaj la salutmesaĝo de L.C. Zaleski-Zamenhof al la kongresanoj. Ili estas legeblaj en la unua paĝo de la ĉiutaga kongresa gazeto "VIKINGA VOĈO" (n-roj 2 - 3) : http://www.96uk-kopenhago.dk/knap-Bultenoj.html aŭ en la septembra revuo «ESPERANTO» (paĝojn 172 – 173).
- estis tre aparta kaj emociiga momento dum la malfermo kiam la norvega delegitino venis, plorante, saluti la kongresanojn. Ŝia doloro plenigis la zamenhofan salonon kaj poste, ŝia kuraĝo estis fervore kaj longdaŭre kaj stare ovaciita. Tamen, tio neniel povus sanĝi la dramon travivitan de ŝia lando en la antaŭaj tagoj (77 junuloj murditaj de kristana fanatikulo Anders B. Breivik) .
- la multaj kaj variaj aktivaĵoj proponitaj : koncertoj de Ĵomart kaj Natacha, la grupo Espo-Despo, la prezentado de la filmo "La Universala Lingvo", la teatraĵo "la dek tagoj



*KAJTO kantas en la halo kun la publiko*
*Le groupe KAJTO chante dans le hall avec le public*

de Kapitano Postnikov"
- la improvizita koncerteto de la grupo "Kajto" en la ŝtuparo kondukanta al la unua etaĝo de la kongreso-centro . Estis gaja etoso, senpretenda internacia koruso sed tamen vera feliĉo. Mi dankas Michèle kiu ĉeestis al kantatelieroj de Kajto dum tiu kongresa semajno ĉar ŝi estis antaŭinformita pri tiu neprogramita kunveno.
- niaj multaj ekskursoj en Kopenhago kie vivas 1 200 000 loĝantoj (kvin milionoj entute en dana lando) kun vizitoj de la "Amalienborg Palaco", reĝina rezidejo kie gardistoj staras antaŭ la palaco, la Tivoli-parko (kvar milionoj da vizitantoj jare) aŭ la promenado per boatoj por malkovri pitoreskajn konstruaĵojn kaj domojn faritajn el ruĝaj brikoj, malnovajn gren-magazenojn, sed ankaŭ la neevitteblan statuon de la marvirineto, nacia simbolo de la fabelisto Hans Christian An dersen kiu naskiĝis en Odense en la jaro 1805.
- ekskurso por malkovri la la influon de la vikingoj kiuj estis ne nur militemaj gigantoj ; ili vivis kiel bone organizita civilizacio sur la danaj insuloj. Ni vizitis Roskilde kaj ĝian muzeon kie ni povis vidi antikvajn



*Tivoli - la fama Kopenhaga parko, nokte*
*Tivoli - le fameux parc de Copenhague, la nuit*



*Wang Yong-Hong kantas dum la internacia vespero*
*Wang Yong-Hong chante pendant la soirée internationale*

Toutes ces réjouissances nous feront oublier, comme pour bien d'autres congressistes, le coût très élevé de la vie au Danemark. Voilà à ce sujet, en conclusion, un petit poème, plein d'humour, déposé par un anonyme sur la gazette journalière du congrès, à la fin du numéro 3 :

*Avec la verte belle flamme,*
*les jours attendus sont arrivés.*
*Là, ici à Copenhague,*
*cette ville où tout est chèrement payé.*

*Voir page suivante un lien pour découvrir les photos en grand format (avec son) et/ou les télécharger.*

kaj aŭtentajn vikingajn ŝipojn. Poste, per aŭtobuso, ni eĉ ekvidis kelkajn tomb-montetojn tra bukolika kamparo.

- la ekskurso sur la spuroj de Andersen en la kastelo "Holsteinborg" kie tre ofte la fabelisto estis la gasto de la familio kiu vivis tie ĉar li ege amuzis la infanojn. De post lia foriro, du ĉambroj de tiu epoko neniam estis tuŝitaj.

Feliĉe tiuj ĝuoj forgesigis nin, same kiel al multaj aliaj kongresanoj, la tre altajn vivkostojn en Danio. Konklude, jen pri tio gaja poemeto skribita de anonima kongresano fine de la tria kongresa kuriero :

*Kun la bela verda flago,*
*Venis l'atenditaj tagoj,*
*Tien ĉi, al Kopenhago,*
*L'urbo de tre kostaj pagoj.*

*Vidu je sekvanta paĝo ligon por malkovri pli grandajn fotojn (kun sono) kaj/aŭ elŝuti ilin.*

# La "Zamenhofa Tago" en Le Mans

Le dimanche 11 décembre 2011 s'est déroulée, au Mans, la traditionnelle «Zamenhofa Tago ».

Cette année, la journée festive coïncidait avec :
- le 20ème anniversaire du Groupe Espéranto du Mans (GEM)
- le 20ème anniversaire de la disparition de Gaston Waringhien, illustre grammairien et écrivain, collaborateur du Grand Larousse Encyclopédique, membre de l'Académie d'Espéranto, co-auteur du «Plena Ilustrita Vortaro» un dictionnaire tout en espéranto et auteur du «Grand dictionnaire Espéranto-Français». Il est enterré à Aigné, petite commune à l'ouest du Mans.

Une trentaine de personnes ont participé à cette rencontre dont 4 Angevins et 2 Saumurois. Après l'accueil chaleureux des Manceaux, la matinée fut consacrée au «Musée du Parchemin et de l'Enluminure» situé à Rouillon, tout près du Mans. La visite fut assurée par un vrai professionnel, créateur de son propre musée, profondément amoureux du métier, allant même jusqu'à enseigner les techniques du moyen-âge à de jeunes stagiaires. De nombreuses boutades et jeux de mots ont agrémenté notre parcours.
Vous trouverez un petit compte-rendu de la visite sur notre prochain «Anĝeva folio».
Le repas de midi fut servi au centre du Gué Bernisson situé dans le quartier sud-est du Mans. L'ambiance était au rendez-vous. Les angevins ont poussé la chansonnette avec les tourangeaux et les manceaux, leur président Jacques Baratié en tête. Collectivement emportés par l'ambiance, les espérantistes l'ont obligé à battre le rappel pour la conférence de son invité espérantiste russe, Aleksander Melnikov, venu présenter sa ville de Rostov sur le Don. Cette ville, située au sud-est de la Russie, est jumelée avec Le Mans depuis le 23 mai 1981. On y dénombre 1,2 million d'habitants et plus de 600 monuments.
La conférence diaporama était en espéranto et traduite en français pour le public et quelques personnes de l'office du tourisme du Mans qui étaient venues se joindre à nous. Le débat qui s'ensuivit a suscité quelques questions sur les problèmes actuels en Russie : la politique et les élections, l'octroi des visas, la peur de l'espion...
On n'oubliera pas de mentionner également la très belle exposition de panneaux réalisés par le groupe du Mans sur la vie de Gaston Waringhien. Merci à nos amis du Mans pour le plein succès de cette rencontre.

Dimanĉon, la 11-an de Decembro 2011, okazis en Le Mans la tradicia «Zamenhofa Tago ».
Ĉi-foje, la festa tago disvolviĝis samtempe kiel :
• La 20-a datreveno de la Esperanta Grupo en Le Mans (GEM)
• La 20-a datreveno de la morto de Gaston Waringhien, famkonata gramatikisto kaj verkisto, kunlaboranto pri "Grand Larousse Encyclopédique", membro de la Esperanta Akademio, kunfaranto de la "Plena Ilustrita Vortaro" (plena Esperanta vortaro) kaj aŭtoro de "Grand dictionnaire Espéranto-Français". Li estas entombigita en Aigné, eta komunumo okcidente de Le Mans.



*Aleksander MELNIKOV*

Trideko da personoj partoprenis en tiu renkontiĝo, el kiuj kvar Anĝevanoj kaj du Saumur-anoj. Post la varmkora akceptado de la grupanoj de Le Mans, ni dediĉis nian matentempon al vizito de pergamena kaj miniatura arto-muzeo. Ĝi situas en Rouillon, urbeto apud Le Mans. Vera profesiulo gvidis nian viziton. Li estas kreinto de sia propra muzeo, profunde ŝatanta tian metion ; li eĉ instruas mezepokajn teknikojn al junaj staĝantoj. Li diris multnombrajn spritaĵojn kaj vortludojn dum nia matenirado en la muzeo. Vi trovos etan raporton pri nia vizito en la venonta "Anĝeva folio".

La tagmanĝo estis servita en la "Centro Gué Bernisson" kiu situas en sud-orienta kvartalo de Le Mans.

Tie regis bona etoso. La Anĝevanoj akompanis la kanzonetojn, kiujn varme kantis la klubanoj de Tours kaj de Le Mans, Jacques Baratié, la prezidanto de GEM unuavice... Rapide, la Esperantistoj estis kolektive absorbitaj pro la varma etoso. Tial, Jacques plurfoje alvokis nin al la prelego de sia esperantista rusa gasto : Aleksander Melnikov. Li venis prezenti al ni sian urbon nomatan Rostovo ĉe Dono. Tiu urbo, de sud-orienta Rusio, estas ĝemeligita kun Le Mans depost la 23-a de Majo 1981. En tiu urbo, oni nombras 1,2 milionojn da loĝantoj kaj pli ol 600 monumentojn.

La lumbilda prelego estis tradukita en la francan por la publiko kaj la membroj de turismoficejo kiuj kuniĝis al ni. Debato sekvis la prelegon kaj estigis kelkajn demandojn pri nunaj problemoj en Rusio kiel : politiko, balotoj, favordono de vizoj, timo pro spionoj, ktp.

Cetere, oni ne forgesos mencii la belegan ekspozicion pri la vivo de Gaston Waringhien. La paneloj estis faritaj de la klubanoj de Le Mans.

Ni dankas niajn geamikojn de Le Mans por la plensukceso de tiu kunveno.

Pliajn renkontojn en 2012 vi povas trovi en nia retejo : www.esperanto-angers.fr/spip/spip.php?article89

LA ANĜEVA FOLIO
LA FEUILLE ANGEVINE

## Estas mi esperantisto

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto ;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
"Netuŝebla Fundamento".
Tuŝu ĝin nur la Mefisto ;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo ;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto ;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido :
"Bonan tagon ! Ĝis revido !"
Ĝi sufiĉas por ekzisto ;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikas,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto ;
estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
sed nenion mi oferas.
Mi ne estas ja bankisto ;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto ;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento.
Ĝi sufiĉas por sofisto ;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
staros "rondo familia",
nekrologos ĵurnalisto :
estis li esperantisto.

*Julio Baghy - 1933*

# Kalendaro

## Selektitaj renkontoj en Eŭropo je Januaro, Februaro kaj Marto

**5 - 8. januaro**
Vintra renkontiĝo en Lesjöfors, Svedio. Agrabla vintra semajnfino. Inf.: Esperanto-domo, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, **Svedio**, Tel. +46-(0)590-30909, mobil +46-(0)70-767 54 55. Rete: egarden@esperanto.se

**13 - 15. januaro**
'Ni festivalu!' semajnfina aranĝo - eblo por ajnaj grupaj renkontiĝoj, kiu inkluzivas precipe 'Ni teatrumu!', Barlastono, Britio. Staĝo pri Esperanta teatro. Inf.: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE, **Britio**. Tel.: +44-(0)1782-372141
Rete: eab@esperanto-gb.org

**13 - 15. januaro**
'Drondo', Barlastono, Britio. Semajnfina Esperant-lingva diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj. Inf.: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE, **Britio**. Tel.: +44-(0)1782-372141. Rete: eab@esperanto-gb.org

**18 - 25. februaro**
19-a E-korusa staĝo ĉe Pireneoj, ie norde de Andoro. La 19-an fojon ni ĉe Pireneoj en 21 jaroj aranĝas tutsemajnan korusan staĝon sub gvidado de esperantlingva korusestro, ĉifoje Xavier Rodon i Morera, kantisto de la jam famega muzik-grupo Kaj Tiel Plu el Barcelono. Eblos ĉiutage kanti 5 horojn, ankaŭ E-ludi, post-tagmeze skii aŭ siesti, turisme vizitadi, ktp. Inf.: Tutpeko ĉe Jorgos Esperanto - Mirevia - FR-11420 LAFAGE, **Francio**.
Rete: tutpeko@aliceadsl.fr

**19. februaro**
Esperanto-Maskerado "Paždroć" en Rijeka, Kroatio. Esperanto-Maskerada Kompanio "Paždroć" en Rijeka. Vi povas aliĝi al Esperanto-Karnavala grupo kaj ĝui karnavalon kiel partoprenanto aŭ spektanto. Inf.: Esperanto Societo Rijeka, Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, **Kroatio**. Rete: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

**22 - 24. februaro**
Esperanto-konferenco en Alikanto, Hispanio. Printempo dumvintre en la mondfama mezmara urbo kun subtropika klimato. Esperanto, kulturo, librobazaro, feriado. Antaŭ- (18-19. febr.) kaj postaranĝoj (25-26. febr.). Inf.: Verde Vivi, Querstr. 11, DE-66287 Quierschied, **Germanio**. Tel. +49-171-6972721. Rete: drfjd@web.de

**22 - 26. februaro**
6-a Vintra Internacia Semajno por Esperantistoj (V.I.S.E) en Buŝteni, Rumanio. 6-a Vintra Internacia Semajno por Esperantistoj (V.I.S.E) estas kleriga, kultura, turisma kaj sporta aranĝo en Rumanio, Buŝteni kaj Montaro Buĉeĝi. Okaze de Semajno de Internacia Amikeco, ni invitas vin pasigi kelkajn tagojn de la jaro 2012 en belega etoso, kune kun la membroj de E-klubo "AMIKECO" el Braŝovo, Rumanio. La programo estas por skiemuloj, sed ankaŭ por neskiantoj! Inf.: Rodica Todor, B-dul Valea Cetăţii 22, bl. B 24, sc. A, ap. 5, RO-500289-Braşov, **Romanio**.
Rete: rodica_todor@yahoo.com

**25. februaro - 3. marto**
Mediteranea Esperanta Semajno 2012 en St Raphaël, Résidence Val d'Esquière - Les Issambres, Francio. Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro! Inf.: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR-83700 Saint-Raphaël, **Francio**.
Rete: prezmoni@hotmail.com. Tel. +33(0)494830688

**7 - 11. marto**
Bibliaj Tagoj en Trento, Italio. Ekumenaj bibliaj tagoj kunigas kristanajn aŭ almenaŭ spirite malfermajn esperantistojn por okupiĝo pri tekstoj el la Biblio, ekskursoj kaj ekumenaj rilatoj (katolika, protestanta, ortodoksa), kaj kantado i.a. el la ekumena kant- kaj preĝlibro "Adoru". Inf.: Stefan Lepping, Mellinstr.5, DE-59457 Werl, **Germanio**. Rete: stefanlepping@gmx.de

*Fonto: http://www.eventoj.hu*

### Fotoj el la Kopenhaga Kongreso
### Photos du Congrès de Copenhague

Por vidi plenformate (kun sonfono), aŭ elŝuti la fotojn de "Nia kongreso en Danio" (kaj eĉ multe pli):
Pour voir en plein format (avec fond sonore), ou télécharger les photos de "Nia kongreso en Danio" (et même bien plus) :

1 - Alklaku la jenan ligon :
- Cliquez sur le lien suivant :

http://mogovoeo.magix.net/userwebsite?uid=A9E2B2A092C211DD96A13C4A58B80423&show_login=true

2 - Skribu en (écrivez dans) :
adresse e-mail => 021@folio.eo ; mot de passe => AF21

3 - Alklaku (cliquez sur) => Login! ;
poste maldekstre alklaku (ensuite à gauche cliquez sur) => AF21*

### Funebroj en nia Esperantista familio

René Borain forpasis la 5-an de Decembro en Saumur. Li ĉiam partoprenis en niaj kunvenoj. René restos en nia memoro kiel afabla kaj bonhumora amiko.
Ni ĵus eksciis pri la forpaso de nia plejaĝulino Bérengère Cheverry, 103 jaraĝa.
Pli longa artikolo aperos en nia venonta gazeto.